Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 14-an de marto 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 15-an de februaro 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

**3. Stato de Esperantonia**
Esperantonia nun estas en sufiĉe bona stato por esti luigata al kunvenoj, sed ne festoj. La posedaĵoj de Douglas estonte estu kun li en lia loĝejo. Ni proponas interrete kunveni kun Oslo-anoj por interkonsenti pri rutinaj farendaĵoj en Esperantonia. Proponata dato: la 4-a de aprilo. Bård organizos.

**4. Asisto al Douglas**
Ni daŭrigu la regulan kontakton kun Douglas, telefone kaj skribe. Ni provos forigi la respondilan voĉon (NEL) de lia telefono kaj aranĝi, ke li havu ĉe si uzeblan komputilon.

**5. Kasistaj rutinoj**
Claude informis pri ordigado kaj aŭtomatigado de financaj aferoj de NEL.

**6. Norvega Esperantisto**
Claude prizorgos, ke Otto Prytz ricevu NE 2/2024 en legebla formato. La plimulto de la kromekzempleroj de NE 2/2024 nun estas en Esperantonia.

**7. Printempaj kursoj**
La kurso havas kvar partoprenantojn, ĉiuj progresantoj. Okazis tri kursvesperoj el kvar antaŭpaskaj.

**8. Jarkalkulo 2023**
Claude informis pri la jarkalkulo, kiun baldaŭ traktos la revizoro. Estas daŭre jara malprofito de ĉ. 20.000 kronoj. Tamen estis en 2023 profito de ĉ. 200.000 kronoj pro heredaĵo kaj profito de akcioj.

**9. Jarraporto 2023** – Prokrastita

**10. Abonperado**
Ni decidis ĉesi peri abonojn de eksterlandaj Esperanto-revuoj al membroj de NEL. Membroj nuntempe povas facile mem transsendi sian abonmonon eksterlanden.

**11. Grasrotmottaker**
NEL estu registrita kiel grasrotmottaker. Claude okupiĝos pri tio.

**12. Bitarkivo**
Pri skanado de malnovaj jarkolektoj de Norvega Esperantisto ni decidis, ke la unua prioritato estu Nasjonalbiblioteket (la nacia biblioteko), kaj ni provizore iom atendu pri eksterlandaj skanejoj. Unuavice ni esploru, kio mankas ĉe Nasjonalbiblioteket kaj ĉu eblas faciligi la aliron al NE tie, ekzemple per ID-porten, do ŝanĝi la nivelon de sekureco.

**13. Aĉeto de Esperanto per rekta metodo**
Ni havas nun 35 ekzemplerojn de la lernolibro. Claude esploros la sendokostojn se aĉeti pliajn.

**15. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaŭdon la 18-an de aprilo 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund